ISLANDA LINGVO–POLITIKO

Baldur Ragnarsson

IKU–Prelego dum la 76a UEA–Kongreso en Bergen

Resumo el la Kongreslibro:

Dum 1100 jaroj islandanoj parolis sian propran lingvon, la islandan, rekte devenantan de la pranordia lingvo. Morfologie ĝi apenau ŝanĝiĝis dum tiu tempo, tiel ke nuntempe islandano facile legas librojn verkitajn komence de la "skriba periodo" en la 12a jarcento. Rimarkinde malmultaj pruntvortoj troviĝas en la islanda vorttrezoro kompare kun la parencaj skandinavaj lingvoj; tio ŝuldiĝas grandparte al forta purisma tendenco, ekflorinta en la pasinta jarcento kaj dauranta ĝis nun. Tiu tendenco estas celkonscia en la senco, ke dum la lastaj jardekoj komisionoj kreis centojn da novaj vortoj per diversaj fakoj surbaze de vortradikoj kaj morfologiaj rimedoj ekzistantaj en la lingvo. Tiu vortkrea laboro ligiĝas al la ĝenerala opinio de islandanoj, ke aparta memstara lingvo estas la plej grava subtenilo de propra nacia kulturo kaj de nacia autonomeco. El europa vidpunkto ne nur la islanda, sed ankau la nordia kulturo entute, havas marĝenan pozicion kiu daure elmetiĝas al influoj de la pli grandpopolaj landoj en la sudo. La pozicio de la islanda lingvo estas tial intime ligita al la pozicio de la aliaj nordaj lingvoj.

En rilato kun la kongresa temo ĉi–jara: Nordio – ĉu modelo? neeviteble ligigas pritrakto de lingva politiko. La nordiaj lingvoj apartenas ĉiuj al la ofte tiel nomataj "malgrandaj lingvoj", lingvoj parolataj de malgrandaj popoloj ligitaj al unu teritorio. Estas konata fakto, ke tiuj "malgrandaj" lingvoj estas en la moderna tempo minacataj de la "grandaj" pere de kreskanta internacia komunikado kaj ekonomiaj influoj. En la nordaj landoj anglaj kaj usonaj influoj sur la koncernajn lingvojn estas la plej senteblaj. Ĉiu kiu povas legi ekzemple danajn jurnalojn kaj magazinojn ja tuj konstatas la svarmon da anglaj pruntvortoj. Certe multaj nordianoj jam komencis timi pri la sorto de siaj lingvoj sub la ĉiam pli minacantaj influoj de la angla.

Unu el la nordiaj lingvoj estas la islanda, parolata de nur 250 mil homoj en Islando. Malmulte konata lingvo ĝi estas, persone mi sufice ofte tion konstatis, ricevante demandojn pri tio, ĉu Islandanoj havas apartan lingvon. Ekzistas fama anekdoto pri tio el la lasta jarcento. En tiu tempo Islandanoj estis ankorau sub la rego de la Danoj. Islandano, Grímur Thomsen, tiam servis en la dana diplomatio. Iam, dum iu bankedo, alpaŝis lin belga diplomato, kiu demandis lin sarkasme: "Kiun lingvon vi cetere parolas en Islando?" supozante, ke Islandanoj parolas nur la danan. Grímur Thomsen tiam respondis seke: "En Islando oni parolas la belgan." Komprenante la aludon tiu Belgo rapide lin forlasis.

Jes, Islandanoj ja havas sian apartan lingvon. Ĝi eĉ estas tiom aparta, ke iuj – emas nomi ĝin relikvo el la antikvo. Fakto estas, ke la islanda lingvo fidele konservis la komplikan morfologion de la antikva pranorda lingvo, de kiu originas ĉiuj lingvoj skandinavaj. La dana, la norvega kaj la sveda lingvo grandparte perdis siajn originalajn morfologiajn trajtojn, ekzemple la kvar substantivajn kazojn, la islanda konservis ilin kune kun la komplikaj konjugacioj de la verboj. Tio certe ŝuldiĝas al multaj faktoroj aktivaj en la historio de la islanda popolo. Unu estas la izoleco de la lingvo, izoleco, kiu cetere ne plu ekzistas en la moderna tempo. Alia estas la multjarcenta

literatura tradicio, kiu originis jam en la 12–a jarcento. Tria estas la konscio pri la pureco de la lingvo kaj la neceso ĝin konservi, kio havas sian originon en la fino de la 16–a jarcento kaj atingis sian apogeon en la lasta jarcento kaj kiu ankorau ĝis nun direktas la islandan lingvan politikon.

Por kompreni la aktualan sintenon de Islandanoj al sia lingvo, la vidpunkton de lingva kultivado, au málrækt, kiel oni ĝin nomas islandlingve, estas necese rapide superrigardi la historion.

Pri la sinteno de Islandanoj antikvatempe al la propra lingvo ni havas informojn nur nerektajn. Rektaj informoj troveblas nur ekde la komenco de la 17–a jarcento. Antau tiu tempo oni povas juĝi nur surbaze de la lingva uzado mem, kiel ĝi aperas en la mezepoka literaturo islanda kaj en priskriboj kaj taksoj pri la lingva elstareco de iuj personoj en sagaoj kaj en la libro Edda de Snorri Sturluson, kiu enhavas pritrakton de la pranorda mitologio. Kio tre evidentas en tiu malnova literaturo estas efektiva kulto de la vortarto: la stilo de la sagaoj estas ankorau hodiau vera modelo de klareco, vorta ekonomio kaj arta esprimado. En la antikva poezio same klara konscia kulto de la vorto, kvankam alitendenca: tie elstaras lingvo bilda, ofte komplike kunmetita, kio oftokaze rezultas en kreo de novaj vortoj. Mi atentigas pri la vorto "kreo", ĉar ne temas pri pruntvortoj, sed vortoj kreitaj el vortaj elementoj jam ekzistantaj en la lingvo. Efektive, tiu tendenco ankorau nuntempe karakterizas la procezon de pligrandigo de la islanda vortostoko, kio siavice kongruas kun la purismo reganta koncerne la islandan hodiauan lingvon. En la sagaoj kaj en la primitologia Edda–libro de Snorri Sturluson oni ankau ofte trovas menciojn pri la lingva kompetento en personaj karakterizaĵoj. Ekzemple estas tiel dirite pri Oðinn, Odino, la ĉefa parnorda dio, ke li ĉiam parolis verse, ne proze. Pri reĝo Olaf la Sankta, reĝo de la Norvegoj en la frua 11–a jarcento, pri kiu Snorri Sturluson verkis faman sagaon, estas menciite, ke li estis "kuraga kaj elstara parolanto". En tiu tempo, kiam lingvo skribita estis ankorau nekonata en la Nordo, la kapablo forte kaj bele paroli estis alte taksata.

Aparte menciinda estas traktaĵo gramatika pri la antikva islanda

fonologio, verkita malfrue en la 12–a jarcento de nekonata autoro, ofte nomata la "unua gramatikisto" en modernaj filologiaj libroj, ne nur islandaj, sed ankau alilandaj. Tiu gramatikisto nome eltrovis la metodon de substituado por decidigi pri signifodistingaj vokaloj en la lingvo, metodon, kiu estis eltrovita denove nur en la komenco de nia epoko. Tiel li povis distingi inter 28 monotongaj vokaloj en la antikva islanda lingvo, kio estas ja konsiderinda nombro kompare kun la nombro 8 en la moderna lingvo. Tiun esploron li efektive faris por plue adapti la latinan alfabeton al la tiutempa lingvo. Ekzistas pliaj gramatikaj traktaĵoj; el tiu tempo, kio montras, ke en la frua mezepoko troviĝis islandaj erudiciuloj, kiuj multe pensis pri la lingvo, kaj subtenis per siaj esploroj verkadon en la nacia lingvo, kiu pleje floris en la 13–a jarcento.

La alveno de kristanismo al Islando komence de la 11–a jarcento vaste efikis sur la kulturon de la nacio, kaj ankau sur la lingvon. Granda nombro da novaj konceptoj estis akceptitaj, ofte akompane kun fremdaj, plejparte latindevenaj vortoj, kiuj plene adaptiĝis al la lingvo en la paso de la tempo. Tiu adaptiĝo konsistis en tio, ke la novaj vortoj ricevis morfologiajn trajtojn, konformajn al la lingva strukturo, ekzemple kazajn finaĵojn: ofte la vortaj radikoj estis ankau modifitaj lau reguloj de la islanda fonologio. Jen ni havas jam la metodon, kiun uzas la islanda lignvo por plenrajtigi pruntvortojn ankau en la moderna tempo. Por doni nur unu ekzemplon el la kristanisma lingvo: por episkopo, origine greka vorto, la islanda havas la vorton biskup, kiu estas deklinaciata ĉi–maniere: nominativo kaj akuzativo: biskup, dativo: biskupi, genitivo: biskups, en pluralo: nomintativo: biskupar, akuzativo: biskupa, dativo: biskupum, genitivo: biskupa. Tiamaniere la reguloj de la islanda lingvo subigas la fremdecon de la pruntvortoj kaj sekurigas ilian pozicion en la lingvo, faras ilin islandecaj. Mi tamen tuj menciu, ke ĉi tie ni ja ne havas la ĉefan vortar–riĉigan metodon, ĝi estas antau ĉio kreado de novaj vortoj el purislanda lingvomaterialo por novaj konceptoj kaj objektoj.

La 13–a jarcento estis la flora tempo en la antikva islanda literaturo. Dum tiu periodo estis verkataj la famaj Islandanaj sagaoj kaj aliaj ĉefverkoj. La

vortuzo kaj stilo de la sagaoj estas lakonaj kaj senornamaj, precizaj kaj konkretaj. En la dua parto de tiu periodo fremdaj influoj tamen komencis efiki sur la arton de rakontado. Tiuj influoj venis el sudaj landoj, precipe Francio, kie regis alia literatura modo, pli multvorta, pli ornameca. Jam en la 13–a jarcento estis tradukataj en nordlingvan prozon francaj rakontaj poemoj pri kavaliroj kaj iliaj aventuroj. Dum la 14–a jarcento Islandanoj mem verkadis abunde tiajn rakontojn lau la sud–devena modelo. La stilo de la francaj distanciĝis for de la klasika sagao–stilo, precipe en longaj kaj pompaj priskriboj, kio estis io fremda al la antaua lingvo–uzo. Iuj pruntvortoj el la franca ankau tiam eniris la lingvon, kiuj tamen plejparte malaperis en postaj jarcentoj.

Estas necese ĉi tie aparte emfazi la fakton, ke malgrau la populareco de la franc–devenaj romancoj en tiu periodo, la indiĝenaj sagaoj estis daure kopiataj kaj legataj de la popolo. Tiu tradicio de legado dauras ankorau ĝis nun, en nuntempa Islando. Tiu tradicio, en ligo kun rimitaj romancoj, bazitaj sur la prozaj, faris netakseblan servon por konservi la lingvon, tiel ke ne estas malpli facile por Islandanoj nuntempe legi tiun antikvan literaturon ol ordinarajn modernajn romanojn. Iuj vortoj ja elfalis el la uzado en la paso de la tempo, sed esence la lingvo de sagaoj estas plene aktuala ankorau en la moderna lingvo. Tio ja estas unika en Europo, eble en la mondo, neniu alia Europa nacio, lau mia scio, povas tiel facile legi sian malnovan literaturon, tiel senpere, sen traduko au abundaj klarigoj. Oni do povas diri, ke la nuntempa islanda lingvo estas ŝlosilo same bona por hodiaua komunikado, kaj por kompreni la pensojn kaj artan krelaboron de la antikvaj skribistoj islandaj. Alia afero estas koncerne la parolon, la prononco de islandaj dekdujarcentuloj certe sonus iom strange al islandaj dudekjarcentuloj, ĉar la lingvo konsiderinde ŝanĝigis fonetike dum tiuj ok jarcentoj.

La 16–a kaj la 17–a jarcentoj estis iom krizaj por la sintenado de Islandanoj al sia lingvo. En tiu tempo la regado de la Danoj plifortiĝis en la lando kaj la Reformacio anstatauis la Katolikismon. Samtempe la arto de presado estis enkondukita en Islandon. Tiam Islandanoj staris antau

alternativoj: ĉu kontentiĝi je tio ekuzi la danan lingvon en eldonado de libroj, kiuj tiutempe estis nur por–ekleziaj, au evoluigi la islandan lingvon por uzado sur novaj kampoj, kreitaj de novaj cirkonstancoj. Efektive la skriba tradicio estis tro forta en Islando por ke la unua alternativo, ekuzo de la dana, povus sukcesi. Tial la dua alternativo, plievoluigo de la lingvo, estis elektita. Ĉi tiun direkton subtenis ankau alia kultura tendenco, la humanismo, kiu en tiu tempo pli kaj pli enradikiĝis en la nordaj landoj. Ĝin ĉie akompanis kreskanta intereso pri la naciaj lingvoj. Multaj bibliaj tradukoj de la reformistoj fakte fariĝis la fundamento de moderna skriblingvo de multaj popoloj. Ekzemple la traduko de la biblio far de Martin Luther konsiderinde kontribuis al la formiĝo de la moderna germana skriblingvo. Malfaciloj estis multloke, kaj la sorto de la islanda lingvo tre eble estus fariĝinta diferenca, se ne estus tiam ekzistantaj tiaj cirkonstancoj en Islando, ke tie estis seninterrompa literatura agado ekde la komenco de skribado en la 12–a jarcento. Sed jen baldau eniris la scenejon homoj, kiuj sciis plentaksi la valoron de la nacia lingvo kaj faris sian eblon por konservi ĝin pura kaj fari la naturan lingvon lingvo skriba. Estas granda dubo pri tio, ĉu la islanda lingvo estus travivinta la premon de la Reformacio, ties fortajn danajn fluojn, se la Islandanoj ne estus havantaj tiun tradician kutimon ĉiam verkadi kaj kopiadi la antikvajn verkojn.

En tiu kriza periodo aperis la unuaj signoj de tendenco, kiu plifortiĝis en la postaj jarcentoj, precipe en la 19–a kaj 20–a jarcentoj, la tendenco de lingva purismo. La purisma skolo havas sian firman originon en la eldona agado de la episkopo Guðbrandur Þorláksson (1542–1627). En fama antauparolo al sia Himnara Libro (1589) li skribas ĉi tiel pri la gepatra lingvo, klarigante siajn principojn koncerne la lingvaĵon de la himnoj: "Tial, kaj ankau por honori nian gepatran lingvon, kiu en si mem estas kaj klara kaj bela kaj ne bezonas akcepti prunte vortojn au lingvajn esprimojn el aliaj lingvoj, mi ĉiam ekde la komenco de mia ofico deziris kaj klopodis, ke niaj himnoj estu per mola arto kaj ĝusta aliteracio kaj metriko tradukitaj, tamen fidele lau la originaloj germanaj kaj latinaj."

Sed estas nur en la 18–a jarcento, ke la lingva purismo fariĝas pli celhava

kaj pli decida ol antaue. En tiu tempo diversaj danaj intelektuloj forte batalis kontraŭ ĉiam kreskantaj influoj de fremdaj lingvoj sur la danan. Islandaj studentoj en Danlando estis influataj de tiu klopodado, kaj hejmenveninte al Islando komencis labori en ties spirito. Aparte menciinda estas la Vojaĝlibro de Eggert Olafsson, en kiu i.a. estas priskribitaj la lingvaj kutimoj en Islando lau landpartoj, kiujn li prijuĝis lau purisma kriterio. En 1779 estis fondita kultura societo, La Societo de Sciendaj Artoj, kiu per sia ĉiujara revuo decidis definitive la direkton de la islanda lingva purismo. Tiu revuo estis karakterizita de klerismaj vidpunktoj kaj aperigis edukajn artikolojn pri la plej diversaj temoj: naturscienco, fiziko, minado, agrikulturo ktp. Ankau aperis tie tradukoj de literaturaj verkoj. Tiu kultura societo jam komence metis al si tiajn laborregulojn, ke ĝi celu protekti kaj konservi la nordan lingvon, t.e. la islandan, kaj klopodi elsarki el ĝi fremdajn vortojn kaj slangaĵojn. En ties revuo oni evitis fremddevenajn vortojn, krom eventuale tiujn, kiuj jam ekzistis dum jarcentoj en la lingvo, kaj por esprimi novajn ideojn, kiuj ĝis tiam ne estis pritraktitaj islandlingve, oni aŭ donis novajn signifojn al malnovaj islandaj vortoj au kreis novajn vortojn el islanda lingvomaterialo. Ĝenerale oni povas diri, ke ĉi tiun direkton rilate la lingvon oni sekvis ĝis la hodiaŭa tago en Islando. Estas aserteble, ke post tiam preskaŭ ĉiu islanda verko pritraktanta novajn temojn antaŭe ne traktitajn en la lingvo, enhavas pli–malpli da novvortoj.

La 19–a jarcento estas la tempo de alceliĝo al nacia sendependeco en la islanda historio. Tiu klopodado, kondukata ne per armiloj, sed per argumentoj, atingis sian celon en 1918, kiam Islando akiris sendependecon de sub la rego de la Danoj. Grava faktoro en la sendependiĝa strebado estis la ekzisto de aparta, propra nacilingvo. Ĉi tie politiko kaj prilingva konscio kuniĝis sur la sama vojo. Multaj homoj tie ludis gravan rolon, precipe islandaj intelektuloj loĝantaj en Kopenhago. Revuoj estis eldonataj, kiuj traktis samtempe politikon kaj lingvajn aferojn. Aparte menciinda estas la revuo Fjölnir, sed inter ties redaktoroj estis la poeto Jónas Hallgrímsson kaj la filologo Konráð Gíslason. De Fjölnir aperis naŭ jarkolektoj, la lasta en 1847.

Tiel influa estis ĝia pritrakto de la lingvo, ke poste fariĝis multe pli malfacile uzi fremdajn pruntvortojn en publikaĵoj. En la dua parto de la 19–a jarcento daŭre kreskis la subteno al la lingva purismo, kaj inter politikistoj kaj verkistoj. La fido al la lingvo plifortiĝis, eĉ ĝis romantika arogo, aŭ por citi unu gravan poeton, Einar Benediktsson: " Ekzistas pri ĉio pensata sur ter'/ celtrafa vorto islanda".

Dum tiu ĉi jarcento, la 20–a, novaj cirkonstancoj, sociaj kaj teknikaj, daŭre faris novajn postulojn al la islanda lingvo. La sinteno de Islandanoj al sia lingvo tamen plejparte restis obstine purismaj, kaj la laborado super renovigo de la lingvo el propraj fontoj fariĝis ĉiam pli intensa. Apartaj vortkreaj komisionoj estis starigitaj por la plej diversaj fakoj, kaj vortaroj kun miloj da novaj vortoj estis eldonitaj. Tamen multaj nun timas pri la elteniĝo de la islanda lingvo, en la alfluego de fremdaj influoj, precipe pere de televido kaj video–bendoj. La angla lingvo ja estas tre sentebla, kaj multaj opinias, ke ĝiaj influoj jam nun minacas la islandan lingvon. Tamen ĝi multe pli efike kaj forte kontraŭstaras tiujn influojn ol la parencaj skandinavaj lingvoj. Ĉi tie ege gravas ne nur la forta morfologia strukturo de la lingvo, sed ankau la ĝenerala akuta lingva konscio de la islanda popolo. Ĉi tie aparte menciindas nova koncepto, kiun mi jam mencietis, la koncepto málrækt, lingva kultivado. Mi nun pritraktos ĝin iom pli detale:

Lingva kultivado signifas samtempe plifortigon de la lingvo kaj ĝian konservon. La plifortigo de la lingvo enhavas jenajn faktorojn: pligrandigon de la vortaro, plian variigon en la elekto de vortoj, plistabiligon de la lingva socio per subteno al la lingvaj uzantoj por majstri la lingvon, kaj kreskigon de fido al la lingvo. Konservo de la lingvo celas tenadi sensŝanga la strukturon de la lingvo, zorgi, ke signifoj de vortoj kaj vortturnoj restu laŭeble stabilaj, protekti la kontinuecon de lingvo tiel ke ĝiaj uzantoj daŭre scipovas legi malnovajn tekstojn laueble. Pro tio, ke jen ni fakte havas la nunan islandan lingvopolitikon en nuksoŝelo, mi volas pritrakti ĉiun faktoron unuope, kiel ili manifestiĝas en la nuntempa islanda lingvosocio.

Unue, la pligrandigo de la vortaro. Mi jam menciis la regantan tendencon

konscie krei novajn vortojn en la islanda lingvo. Cetere novaj vortoj ampleksas tri kategoriojn: vortojn pruntitajn el aliaj lingvoj kaj adaptitajn al la strukturo de la akcepto–lingvo; slangajn vortojn, kiuj ne atingis plenan ekzistorajton en la lingvo; kaj vortojn kreitajn el radikoj ekzistantaj en la lingvo. La lasta kategorio estas tiu, kiu la plej karakterize ecigas la agadon de pligrandigo de la islanda vort–trezoro. Kie la plej multaj eŭropaj lingvoj uzas t.n. internaciajn vortojn kiel psikologio, filozofio, radio, televido kaj telefono, la islanda lingvo uzas sálfræði, heimspeki, útvarp, sjónvarp kaj sími. La kvar unuaj estas vortoj kreitaj, kunmetitaj el radikoj ekzistantaj en la lingvo, sed la lasta, sími, telefono, estas antikva vorto, havanta la signifon "drato" en la Edda–poemoj, al kiu estis donita nova signifo. Tiu tendenco, rifuzi internaciajn vortojn kaj krei novajn el pure islandlingva materialo, ja konfesinde, kauzas iujn problemojn. En la nuna tempo, kiam nova tekniko, novaj kulturaj influoj, inundas la socian vivon, la postuloj al la lingva kreivo estas enormaj. Al tiuj postuloj oni reagas per starigo de specialistaj komisionoj, kiuj sisteme esploras la lingvajn bezonojn kaj proponas solvojn. Tion oni lastatempe faris ekzemple koncerne la vortaron sur la komputila kampo. Sed ne nur specialistoj koncernas sin pri la vortkreado. Tion faras konsiderinde ankau la ĝenerala publiko. Fama ekzemplo el antauaj jaroj estas koncerne la jeton, la jet–aviadilon. Komence oni uzis longan, iom peze kunmetitan vorton: þrýstiloftsflugvél, lauvorte "premit–aero–flugmaŝino". Informisto en la islanda ŝtatradio, kiu ne tre ŝatis tiun vorton, en rekta elsendo kreis novan vorton: þota, ŝajne–spontane, kiu tuj anstatauis la antauan vorton kaj eniris la lingvon. Tiu vorto estas bona ekzemplo pri tio, kion kapablas la lingvo. Ĝi konsistas el la radiko de la verbo þjóta, kiu signifas kuregi, rapidegi. Tiu verbo apartenas al la tiel nomataj ablautaj vortoj, kiuj ŝanĝas la radikan vokalon laŭ fiksitaj reguloj. Unu el tiuj vokaloj estas o, kaj en la vorto þota, jeto, oni uzas precize ĝin. Þot– estas la radiko, la a–finaĵo vicigas la vorton en certan deklinacian kategorion de ingenraj substantivoj.

Malgrau tiu reganta tendenco de vortkreado tamen estas fakto, ke en la

ĉiutaga konversacia lingvo fremddevenaj vortoj ofte aŭdiĝas, precipe inter fakuloj. La novaj vortoj bezonas plejofte ioman tempodauron por enradikiĝo en la lingvo, kvankam ankau okazas, ke tiuj tuj venkas sian fremdan konkuranton kaj senprokraste eniras la ĝeneralan lingvouzon.

La dua faktoro en la lingvo–kultivado koncernas variigon en la elekto de vortoj. Ĉi tio koncernas la ĝeneralan lingvouzon de la lingvouzantoj. La islanda lingvo estas eksterordinare riĉa je sinonimoj sur iuj signifo–kampoj, precipe koncerne la eksteran, objektivan mondon. Oni kalkulis ekzemple, ke troviĝas en la lingvo 314 nekunmetitaj verboj signifantaj diversajn sonojn kaj 360 signifantaj moviĝon. Do ekzistas grandaj eblecoj variigi sian vortelekton en priskriboj de la ekstera mondo, por precizigi kaj nuanci. Tamen, pro ŝanĝiĝantaj sociaj cirkonstancoj tiu elekteblo estas sendube malpli ekspluata ol antaŭe. Nuntempe, la eblecoj de komunikado inter plenkreskuloj kaj infanoj malkreskis simple pro plia laboro de ambaŭ gepatroj ekster la hejmo. La infanoj lernas la lingvon grandparte inter si, kaj en antaŭlernejoj. Ilia lingvo do tendencas fariĝi vortare malriĉa, la lingva maturiĝo prokrastiĝas. Tion oni provas plibonigi nun i.a. per algepatra konsilado, instigante al pli da lingva komunikado inter plenkreskuloj kaj infanoj, oni ankaŭ konsilas laŭtan legadon al junaj infanoj ankorau nescipovantaj legi, ktp. Ankau sur aliaj kampoj oni ekvidas danĝerojn, ne malplej ĉe la t.n. liberaj radiostacioj, kie ofte estas konstateblaj neklara prononco, morfologiaj eraroj, malĝuste uzataj vortoturnoj kaj malriĉa vortelekto. Tia kritiko tamen ne validas pri la islanda ŝtata radio, kie zorga lingvouzo estas nepra postulo. Unu sufice novan eblecon por plivariigi la lingvouzon mi devas mencii, la aperigon antaŭ kelkaj jaroj de la unua islanda sinonima vortaro, kiu sendube bone servas precipe al tiuj, kiuj okupas sin pri verkado kaj tradukado.

Tiaj helpiloj ja estas necesaj kaj bonaj. Sed la tria faktoro en la lingva kultivado, plistabiligo de la lingva socio, antaŭ ĉio rilatas al la lingvokonscio mem de la lingva komunumo. Ĉi tie la islanda socio ja staras sur firma grundo, precipe surbaze de la forta literatura tradicio ekde la 13–a jarcento. Tiu tradicio estis kontinua, sen ia ajn interrompo, tiel ke nuntempaj

Islandanoj facile legas sian malnovan literaturon, la sagaojn kaj la Edda–poemojn, kiel mi jam menciis. La antikvaj libroj aserteble troviĝas en preskau ĉiu hejmo en konvenaj eldonoj, kaj en la lernejoj, jam de la porinfanaj, oni legas iujn el la sagaoj. En la gimnazioj oni traktas la sagaojn detale, sed ne nur tiujn, sed ankau la postan literaturon, kaj en la lastaj jardekoj la moderna literaturo ricevas apartan emfazon. Regulaj elsendoj pri ĉiutaga lingvouzo okazas en la ŝtata radio kun vigla partopreno de la aŭskultantoj. La Ministerio de Edukado iniciatis apartan lingvo–kultivan jaron en 1989, kies efikoj ankorau vigle konstateblas. Tiu kampanjo efektive establis plifirmiĝon de la moderna islanda lingvo–politiko, forte subtenatan de la popolo.

Ĉiuj tiuj faktoroj kontribuas al la kreskigo de fido ĉe la islanda popolo al sia lingvo. Tian fidon ĉiu malgranda popolo ja devas havi en la kirlaj kurentoj de fremdlingvaj influoj en la nuna mondo. Ili ankaŭ intime ligiĝas al tiuj faktoroj, kiuj rekte rilatas al la konservado de la lingvo. La konservado de lingva strukturo, de vorto–signifoj kaj intergeneracia kontinueco estas plej bone garantiitaj per vigla konscio pri la vivanta lingvouzo, parola kaj skriba, kaj pri la evoluigaj eblecoj latentaj en la lingvo mem. Estas rimarkinde, ke ne ekzistas en Islando iu speciala lingva akademio, havanta la taskon iel kontroli aŭ gardi la lingvon. Iusence la popolo mem formas tian akademion. Tio estas ebla nur se la popolo ĝenerale estas akre lingvo–konscia, fidas al la lingvo, amas la lingvon kaj ĝian literaturan tradicion. Kaj tio, laŭ mia opinio, estas precize la kazo ĉe la Islandanoj. Tion establis sendube la vivanta ligo kun la malnova literaturo, la influo de la lingva purismo en la lasta jarcento kaj la malgrandeco de popolo, kiu akiris sian politikan sendependecon antau nur kelkaj jardekoj. Tio tamen ne : signifas, ke tiaspeca lingvo–konscio estas imuna kontrau danĝeroj kaj eleksteraj kaj internaj. Mi menciis antaue negativan ŝanĝiĝon en la lingva edukado de infanoj, kaŭzitan de draste pliiganta partopreno de ambau gepatroj en la labora socia vivo. Danĝeroj ja estas ĉe ni, kaj ne nur pro la anglalingvaj influoj. Sed la grundo estas firma kaj la lingvo estas forte vivanta kaj tio donas multe da espero pri la futuro de

la islanda lingvo.

Ĉu ni, esperantistoj, povas ion konkludi el la islanda ekzemplo? Multo ja malsimilas, ekzemple la strukturo de Esperanto, kiu faciligas adapti fremdajn vortojn lau la fama 15–a regulo de la Fundamento. Tiu faktoro ja tentas multajn enkonduki novajn vortojn en Esperanton, eble tro facile. Sed la strukturo de Esperanto donas ankau senfinajn eblecojn por krei vortojn, kaj tion ja konscias ĉiu esperantisto. Mi opinias, ke precize tiuj vortokreaj kapabloj de Esperanto estas la plej fidodona faktoro rilate la lingvon, kaj ĝin ni devas plue varti kaj ekspluati. Akademion ni ankau havas kaj ĝi havas siajn taskojn lau difino. Sed sen vivanta lingvo–konscio ĉe la ordinaraj esperantistoj mem, tia Akademio estas senefika. Plej dezirinde estus, ke la ĝenerala uzado de Esperanto, konstante rivelus tioman zorgon pri la kontinueco kaj bonfarto de la lingvo, ke la Akademio havus la taskon nur konstati, konstati ĝian sanan evoluon.

Estimataj auskultantoj, jen mi metas punkton al mia prelego. Mi esperas, ke ĝi kontentige informis vin pri la islanda lingvo–politiko kaj ĝia valoro por la konservo kaj evoluigo de la lingvo en la hodiaua mondo. Mi nur aldonu, ke mi forte opinias, ke nuntempe ĉiu malgranda popolo devas iel difini sian sintenon al la propra lingvo, alie ĝi riskas perdi ĝin pro la kreskantaj influoj de lingvoj pli vaste parolataj, kaj sekve aŭ samtempe sian propran kulturon.

Adreso de la autoro:
Sogavegur 170
IS 108 Reykjavik
Islando